

Sufiĉus simple nekonstante al ĝi tiu lingvo en aliaj de la simpatiantoj kaj ĝi trovas la vojon por fariĝi vere universala lingvo. La dua lingvo por ĉiu homo — ĉi tiu lingvo — kaj ne konstante ĝi tiu lingvo signifas: doni al ĝi tiu lingvo la saman ebla-ecojn kiujn havas la aliaj lingvoj (sur la internacia kampo), ne tiu- ĉi publikigon de la resumoj kaj de sciencaj artikoloj verkita en ĝi tiu lingvo, ĉi tiu lingvo signifas: doni al ĝi tiu lingvo la saman ebla-ecojn kiujn havas la aliaj lingvoj (sur la internacia kampo), ne tiu- ĉi publikigon de la resumoj kaj de sciencaj artikoloj verkita en ĝi tiu lingvo.

DONU AL SCIENCA REVUO NOVAN VESTON

Laŭ la ĝisnunaj reeĥoj, la legantoj de Sciencra Revuo estas, pli au malpli, kontentaj kun la enhavo de la revuo. Tio ne signifas ke ĝi ne povas esti ankoraŭ pli bona — la tasko de la redakcio estas konstante ankoraŭ estonte zorgi pri plua plibonigo de la enhavo (kio kompreneble dependas ankoraŭ de la kontribuontoj, eĉ pli ol de la redakcio).

Sed multaj legantoj deziras havi ankoraŭ pli belan eksteran aspekton de la revuo, la aspekton kiu kontribuas ke la revuo estu alloga kaj plaĉa ne nur al esperantistoj sed ankoraŭ al neesperantistoj. Venontjare la revuo festos sian dudekjaran jubileon. Kaj ĉu tio ne estas la konvena momento por ŝanĝi ĝian eksteran aspekton, doni al la revuo la novan vestaĵon, kun kiu ĝi eniru la trian dekadon de sia vivo? Sed jam nun ni komencu preparadi la novan vestaĵon!

Kiel aspektu la revuo ekde Vol. 21? Pripensu kaj donu la ideojn. Estu ĉi tiu alvoko siaspeca konkurso inter la legantoj. Partoprenu grandskale la konkurson. La Estraro certe konsentos doni ankoraŭ la premiojn por plej trafaj proponoj (plurjaran, eventuale eĉ la dumvivan, abonon al la revuo, la malnovajn kompletojn de la revuo k.s.).

Rimarko. Jam antaŭ la presigo de ĉi tiu numero ni antaŭvidas iometan malbeligon de la tipografia aspekto en ĉi tiu numero, devenanta de la ŝanĝo de la presejo. Sed la novaj kompostistoj rapide spertigos en kompostado de Esperanta teksto kaj ni esperas ke vi estos jam kun la sekvanta numero multe pli kontentaj ol ĝis nun.

La redakcio

Bonvolu atenti la novan adreson de la sekretario de ISAE kaj de la ĉerfredaktoro de Sciencra Revuo:

Prof. Boŝ. Popović

Ognjena Price 80

BEOGRAD, Jugoslavio

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Sciencra Asocio

Esperantista, Vol. 19. n-ro 2 (1968)

51(477) „15” (091)

UKRAINA SCIENCISTO DE XV JARCENTO JURIJ DE DROHOBYĈ

(Jar. Matvijiŝin, Kiev, Sovetunio)

La kreado de la unua ukraina¹⁾ doktoro de filozofio kaj medicino, de astronomo kaj verkisto, de aŭtoro de unua presita libro, skribita de Galiciano origine, de l'edukito de Krakova kaj rektoro de Bolonja Universitatoj²⁾ — eltrovigas la novan paĝon de malmulte konata periodo de la frua ukraina Renesanco.

Diversflanka kreado de Jurij de Drohobyĉ³⁾ altiras atenton de sciencistoj⁴⁾ ankoraŭ pro graveco de la kulturaj kaj sciencaj rilatoj inter Okcidenta kaj Orienta Eŭropo.

1) Uzata esprimo rilatas nunan staton de ukraina popolo. Anstataŭ „ruteneno”, „roksolano”, „maloroso” k.a., aŭtoro ĉiam estonte uzos „ukraino” (ukraina) kiam ĝi ne tiros post si miskomprenojn.

2) nomitaj tiam kiel akademioj.

3) Jerzy z Drohobycza, Georgius de Leopoli, Georgius de Russia k.a. (Mi preferas ne uzi Jurij el Drohobyĉ.)

Jurij (vera nomo Koterman) naskiĝis ĉirkaŭ la 1450. en malgranda urbo Drohobyĉ (Galicio) ĉe familio de etburgo Myĥajlo Donato.

Komencan klerecon li povis ricevi en Drohobyĉ kaj Lviv [I, p.81]. Tiam en Lviv funsciis lernejo⁵⁾, kies lernantojn oni preparigis por la studado en la Krakova Universitato [2, p.95]. Probable ke Jurij lernis en ĉi tiu lernejo.

Interese ke unu eksterlandano [4, p.63—64], vizitinte Ukrainon 100 jarojn pli poste (!), asertas ke »neniaj sicencoj ekzistas tie« (kvankam jam tiam ekzistis Ostroha lernejo preskaŭ supera, »bratska« lernejo en Lviv k.a. [2]).

Tempo de Jurij (XV) certe estis pli saĝa ol tion volas prezenti supremenciita aŭtoro.

Ekzemple, nur el tiu malgranda urbo Drohobyĉ dum 1411—1600 studis⁶⁾ ne malpli ol 32 personoj⁷⁾ [5, I—IV].

Ĉar siajn seriozajn studojn Jurij komencis en Krakovo, tiama ĉefa kultura kaj scienca pola urbo⁸⁾, necesas doni skizitan karakteristikon de lia estonta medio. Ĉi tiu demando jam estas iomete pritraktita el historia kaj medicina flankoj [1], [10], tial min interesos la matematika.

4) Vizitinte Jagelonan Bibliotekon laŭ mia peto, Prof. Mieczysław Sygnarski (lektoro de Esperanto en Jagelona Universitato, Krakovo) estis mirigita »ke jam kvin personoj en la lasta semajno deziris ricevi informojn pri ĉi tiu scienculo« (letero de la 14-an de oktobro 1967).

Dum proksima tempo Ihor Kosteckij kaj Elizabet Kotmajer intencas aperigi en serio »Na hori« ukrain- kaj latinlingve verkojn de Jurij Drohobyĉ (centra ĵurnalo »Literaturna Ukrajina«, de la 3-a de oktobro 1967).

5) ti el nomita »kolonio« de Krakova Universitato, kreita ĉ. 1400. Simila lernejo iomete pli malfrue estis kreita en Brody.

6) ni uzas donaĵojn de J. D. Jsajevyĉ, speciale trastuditaj por lia disertacio.

7) Oni ne ĉiam povas rekte indiki naciecon ĝis la XVI jarcento. Vaste konata fakto, ke oni partigis studentojn laŭ tri ĉefaj nacioj en iuj malnovaj Universitatoj de Eŭropo, donas nocion pri malfacilaĵoj je tiu kampo.

8) Vidu: Jerzy Zathej, Anna Lewicka-Kaminska, Leszek Hajdukiewicz »Historia Biblioteki Jagiellonskiej«, v.I, (1364—1775), Kraków, 1966, p.15—43. Jen ekzemplo el ĉi libro Foma de Krakovo ĉ. 1414 jaro skribis el Parizo, kie li pasigis 30 jarojn de sia vivo, al pola reĝo W. Jahelo pri la urbo Krakovo: »Cracovia... serte libris, munda studiis, romana poetis, attica philosophis« (lat.)

Karaktero de tiamaj lernejoj

De la XI jc., paralele al la ekzistantaj ekleziaj lernejoj, ekestas tiel nomitaj »parafialny školy« (parafiaj lernejoj). Kiel lernoobjektoj oni instruas gramatikon, dialektikon (pli ĝuste logikon) kaj retorikon (sume tiel nomita latine »trivium«). Postaj jaroj venigas ŝanĝon: fama »quadrivium« konsistas el kanta scienco (muziko), kalkulado⁹⁾ (aritmetiko), geometrio (kun elementoj de geografio) kaj astronomio (aŭ eĉ astrologio)¹⁰⁾.

Matematikaj informoj estis ĉerpitaj precipe el verkoj de Izydor Sewilski¹¹⁾, Beda¹²⁾, Boecius¹³⁾, Euclid (mallongigoj de »Elementoj«).

Poloj komencas ellandiĝi kaj certe kun ili ankaŭ ukrainanoj, kiuj multnombre loĝis en Krakovo. Ili studis en Montpellier (kie de 1220 j. estiĝis ĉefe medicinaj sciencoj), Avinion (studium gen. de 1303), Padwa (kie estis Universitato de 1222), Bologna (la plej malnova Universitato), Praha (la universitato kreita ĉ. la 1348. oni ofte sendas profesorojn por Krakova Universitato) k.a. [7].

Unua patrolanda sciencisto, kiu famigis pollandon ekster ĝi per sciencaj verkoj, estis fizikisto kaj filozofo Witelo (ĉ. 1225—ĉ. 1280).

Distinginda fakto, ke li emas doni sufiĉe modernajn geometrikajn pruvojn en sia »Optiko«¹⁴⁾.

Kvankam sentiĝas forta influo de araboj, Witelo provas eluzi ĉerpitan sciencon pli proksime al praktika vivo de la homo.

Vico de aliaj sciencistoj, studinte eksterlande, revenadis hejmen kun novaj ideoj.

9) Estas interese rimarkigi, ke jam tiam kalkula arto estis ŝatata, kiel atestas »Kronika Lacinska XII w« de Galla-Anonima.

10) »Trivium« kaj »quadrivium« longe ekzistis samtempe.

11) Jzudor de Sewilja (570—636), »Libri etymologiarum Origines«.

12) angla sciencisto Baeda Venerabilis (ĉ. 673—735) »De temporum ratione« k.a. Vidu lia »Opera omnia 1—12, ed. J. A. Gilles London. 1843—1844. Li diris ofte, ke ĉiam li ŝatas aŭ legi, aŭ studi, au skribi.

13) Anicius Manilius Severinus Boethius (ĉ. 480—524).

14) Vitelona matematyka uczonego: O optyce, to jest o istocie, przyczynie padania promieni, ..., ks. 10. Multfoje reskribita ĝi aperis eldone en la 1535, 1551, k.t.p.

Certan influon por la pola scienco kaj kulturo havis la sama de Kieva Rusj [8], sed de sia flanko Krakova Universitato (kvankam ĝis 1403. jaro ĝi estis kompletita de profesoroj el Praha Universitato [6]) estiĝas kiel granda altira centro, kie de unuaj fondiĝaj jaroj studas ankaŭ ukrainanoj, belorusoj¹⁵⁾, litovoj [6, p.66].

Laŭ reguloj¹⁶⁾ de la 1404. kaj 1406. ĉe sola scienca katedro (tiel nomita katedro de liberigitaj artoj) oni instruigis:

Aritmetikon — dum 1 monato,

Muzikon — 3 monatojn,

Perspektivon — 3 monatojn.

En programo estis menciitaj lekcionoj laŭ »Elementoj« de Euklid. (Aparte pro vizito de ĉi tiuj lekcionoj studentoj devis pagi po 6 groŝojn).

Konserviĝis »Registro de lekcionoj¹⁷⁾ kaj manuskriptoj laŭ kiuj ni povas pri juĝi tiaman studmaterialon¹⁸⁾, kiun studis Jurij de Drohobyĉ en Krakovo.

La vintron 1467—1468 Jurij aniĝas Universitaton. Aniĝantoj devis pagi minimumon almenaŭ kaj tial en listo de pagintoj [5, p.194, v.1] ni vidas noton, ke »je la vintra ŝanĝo Hlorhij Miĥail Drohobyĉ, paginte unu groŝon, estas enskribita sur 253 paĝo, dua de supre«. (cit. laŭ [10]).

Kion povis studi Jurij el matematiko kaj ĝenerale el naturscienco en Universitato?

15) Mi ĉiam sentas mallacilaĵoj okaze de transdono de naciaj nomoj (k.s) en Esperanto. Ekzemple, mi alkiutimiĝis al ukraina, rusa, angla, franca kaj latina originalo. El kiu lingvo mi devis prefere esperantigi »polajn ekzemple familinomojn? Lasi sen ŝanĝoj«!? Sed japana, greka k.a.? Tial propono de IOE estas laŭdinda. (se diri pri biloruso en vortaro de E.A. Bokarjev ni trovas blanko-ruso, beloruso, Rusa-esperanta vortaro« Moskvo, 1966, p.27).

16) statutoj de Granda kolegio.

17) Liber Diligentiarum.

18) iomete naive kaj strange sonas titoloj de tiamaj lerniloj, ekzemple, »Aritmetiko kun muziko« de Jean de Muris, Multajn manuskriptojn dum postaj jarcentoj ni trovas ankaŭ en Rusujo. En Moskva Ŝtata biblioteko oni nomigas ilin »Muzikaj kodektaroj« No... kaj fine aldonas, ke ili entenas »Aritmetikon«.

Jen aritmetiko, krom ĉiama kalkulado kun pozitivaj ne partumaj nombroj, menciindaj estas operacioj kun frakcioj¹⁹⁾, algoritmo de Sakro Bosko²⁰⁾ (poste de Peurbach). Longan tempon lecionojn de aritmetiko en Krakova Universitato legis ĝia iama edukato Albert Blar Brudziewski (1445—1497). Krom lekcionojn pri aritmetiko li instruigis astronomion kaj perspektivon, speciale okupiĝis pri talentaj studentoj, kio estas plej grava por nia temo, ĉar li devis havi iujn rilatojn kun Jurij de Drohobyĉ²¹⁾.

Geometrio, krom tri libroj de Euklid, entenis praktikam geometrion. Jam menciitan verkon de Martin Krol, skribitan sub la influo de Bolonja profesoro Prosdocimo de Beldomandi (1380—1428), nepre devis legi en Pollando aŭ en Italio Jurij Drohobyĉ²²⁾.

Astronomio plejparte estis prezentita kiel astrologio. Sed eluzo de trigonometrio²³⁾, konstanta neceso defini situon de planedoj kaj steloj, nemalgranda neceso de ekleziaj kalendaroj — departigis astronomion de astrologio²⁴⁾, kvankam multaj famaj astronomoj daŭras okupiĝi de tempo pri magiaj antaŭvido k.s.

Tiama naturscienco metafizike amasigas ĉirkaŭnaturajn faktojn. Tempo, kiam „dialektika filozofa Dekarto²⁵⁾ revolucie ŝanĝos matematikon, ankoraŭ ne fariĝis. Sed ĉu eblas imagi postan evoluon de precizaj sciencoj sen tiu ĉi ŝtupo, kiu mem fakte estis progresiva post kelkcentaj jaroj de antaŭa silento.

Naskite de araba, greka kaj hinda scienco ĝi naskigis famegajn Newton (1643—1727), Leibnitz (1646—1716) k.a.

19) algoritmo de Jan de Likkeris. Martin Krol »Algorismus minutiarum« (li estas ankaŭ aŭtoro de libro pri praktika geometrio)

20) Vidu: Mikolaj de Pollando, »Algorismus prosaicus Johannis de Sacrobosko«.

21) Estas nur hipotezo de aŭtoro.

22) Sanpera analizo de matematikaj ideoj, ĝiaj kunligoj, influoj k. s. en verkoj de menciitaj aŭtoroj estas inda apartan artikolon. Ĉar jam komenco de la 90 jaroj (xIV jc) Krakova Universitato havis 16 instruistojn de matematiko, certe tasko estas ne inter la facilaj. (Vidu: A. P. Juŝkeviĉ, „Istorija matematiki v srednie veka“, Moskvo 1961, p. 405).

23) laŭ hinda kaj greka manieroj.

24) Nature astrologio havis flankan infloun por astronomio kaj matematiko.

25) franca filozofa kaj matematikisto René Descartes (1596 — 1650). Esprimo el: F. Engels, „Anti-Djuring“, GIPL, 1952, p. 115.

Junaj tagoj de Drohobyč

En la 1470. Juriĵ Drohobyč ricevis titolon de bakalaŭro, kaj post du jaroj ankoraŭ li magistriĝas²⁶).

Juriĵ estis tre talenta studento. El 208 studentoj, anigitaj kune kun li, titolon de bakalaŭro ricevis 71 personoj, magistriĝis nur 9. Pli frappe, ke el 104 nepolaj studentoj neniu atingis titolon de magistro (bakalaŭriĝis nur 5 studentoj) [1], [10], [5].

Ĉar Krakova medicina katedro²⁷) ne doktrigis ankoraŭ²⁸), multaj finintoj de ĝi daŭrigis siajn studojn en eksterlandaj Universitatoj.

Bazante sin sur la hipotezo de L.A. Birkenmajer, interlie laŭ W. Jeceliusa (1544) [11], ni vidas Juriĵ'n ĉe Istropolitana Akademio en Bratislavo²⁹) (Hungario) kiel profesoron kaj vickancelieron. Ĝis nun ĉi facto ne estas jesigita [1], same kiel sorto de postaj, liaj vojaĝoj ĝis Bolonja periodo³⁰).

Laŭ kutimo ([7], [9]) studentoj daŭrigis studi medicinon en malproksima Universitato de Bolonoj³¹).

Juriĵ aniĝis Universitaton en Bolonjo ĉ. 1474. jaro, ĉar en la 1478—1479 studjaro jam li instruis tie astronomion³²) (dum tiel nomitaj matenaj festaj lekcionoj de astronomio).

En [1] estas interesa fakto de D. Ĉenĉeti (scienca sekretario de la Instituto de la historio de Bolonja Universitato), ke similaj lekcionoj nur estis privilegioj por doktoroj de filozofio.

26) Nur post ĉi tiu magistriĝo li nomigas sin kiel Juriĵ de Drohobyč aŭ Juriĵ de Leopoli.

(Vidu: J. D. Isajevyč „Juriĵ de Drohobyč”, en ukroinlingva gazeto „Znanja ta pracja”, p. 12 — 14, No. 4, 1964). Leopoli estas malnova nomo de tiam la plej grand urbo (en Ukrainio) Lviv.

27) nomita tiam „professio ordinaria” [6]

28) unue oni promociis doktoron nur en la 1527.

29) N. A. Oborin supozas [10], ke Juriĵ vizitis ĝin post Bolonja periodo. Verŝajne li asertas sen antaŭa analizo de historiaj kondiĉoj.

30) Havante okazon mi dankas esperantistojn el Bratislava kaj Budapeŝto (kie poste estis translokigita istropolitana Universitato) pro helpo en la serĉado de necesaj materialoj en arkivoj kaj bibliotekoj.

31) Ankaŭ pro pli malalta pago ol en germanaj Universitatoj [1, p. 81].

32) Mi estas dankema al F-ino Maria Frus (Torino, Italo), kiu afable preparis kaj sendis por mi necesajn fotokopiojn.

Krom tiuj matenaj lekcionoj de astronomio „tri diversaj ordoj de sciencoj matematikaj” aniĝis: „Ad Mathematicam” (aŭ „Ad Astronomiam”, ĉu „Ad Astrologiam”) kaj „Ad Arithmeticeam” (aŭ „Ars metrica”, ĉu „Ad Geometriam”) [12, p. 9—13].

Okupinte rektoran oficon de Bolonja Universitato (1481—1482), Juriĵ daŭrigas studi medicinon. Ofico de rektoro ne estis pagita de urba estraro, mem rektoro estis elektita de studentoj, el medio de eksterlandaj studentoj, kiuj famiĝis dum publikaj disputoj [12, p. 7].

Rektoro havis sufiĉe fortan potencon. Li estis nomita kiel estro de la Universitato, en lia povo estis rajto juĝi en diversaj civilaj kaj juraj aferoj inter studentoj kaj inter profesoroj, kontroli pagon de profesoroj, lekciis dum festaj tagoj (jam menciitaj matenaj prelegoj) k.a. [13].

Humanistaj ideoj vaste disvastiĝas en Italujo. En Neapolo Dĵan Dĵoviano Pontano (1426—1503) kaj lia samideano Lorenzo Vala (1407—1457) prikantas homajn sentojn, la belecon de la naturo. Precipe distingiĝas „Kalimako Esperiente”, Filipino Buonakorsi (1437—1496), kiu revas ne nur organizi revolucion en Romo, sed celas rektan vojon de materialismo kaj ateismo.³³).

Rimarkinda fakto, ke protektanto kaj amiko de Filipino Buonakorsi, florenciano Tedaldi vizitis urbon Drohobyč, kiam tie loĝis ankoraŭ Juriĵ. De li aŭ de liaj amikoj li povis unue aŭdi rakontojn pri malproksima lando. (Filipo mem vizitis Lviv kaj Drohobyč. Vidu cititan artikolon de J. Isajevyč en „Znanja ta pracja”, p. 12).

Kiam Juriĵ de Drohobyč ĉeestadis en Bolonja Universitato, li subtenas amikajn rilatojn kun profesoroj Dĵovani Harconi³⁴) kaj Dĵirolamo Manfredo, korespondas kun pola humanisto M. Ĉepla. Pere de sia malnova amiko, pola matematikisto Mikolaj Wodka Abstemius, li konatiĝis kun Lukaŝ Waŝenrode (onklo de M. Kopernik).

Ni scias tro malmulte pri interrilatoj de Juriĵ kaj reprezentantoj de vaste tiam konata medicina flueco „humanisma naturalismo de medicinistoj”. Analizo de ĝiaj aliaj reprezentantoj eble lumigus ĉi pagon en Bolonja periodo de la vivo de Juriĵ.

33) Pli detale vidu: Bruckhardt „Kultura renesanse w Italiji”, Preveo Milan Prelog Zagreb, Matica Hrvatska 1953.

34) Oni konstatis multnombrajn liajn kontaktojn kan slavaj kaj hungaraj sciencistoj. [6]; [13, p. 251 — 252].

Astronomia kaj medicina verkado

Jurij, kiu ricevis en la 1482. doktoran titolon de medicinisto, estis devigata verki specialan sciencan antaŭvidan kalendaron [14].

Povas esti, ke similajn kalendarojn — antaŭvidilojn li kompilis multfoje, sed pri scienca vizaĝo de Jurij ni juĝas nur laŭ liaj du konservitaj verkoj: unu manuskripta de la 1478. [14], kopiita de la fama germana humanisto Hartman Šedel, kaj presita libro³⁵⁾ de la 1483. [15], kie aŭtoro indikas pri antaŭa, ĝis nun netrovita manuskripto [v. I, p.83].

Malgraŭ tio, ke aŭtoro uzas Ptolomeajn ideojn, kiam li parolas pri situado de la planedoj, menciinda estas fakto de preciza difino de du lunneklipsoj, kiuj devis fariĝi sekvontjare, lunofazoj dum la jaro, kalkuloj pri movo de planedoj en ĉielo.

Donante veterajn prognozojn la sciencisto nepre eluzis pasintajn observojn, kion sekve donas rajton dedukti pri ia sperto en statistikaj metodoj. Jen kial lian libron »Judicium prenostikon« atentigas historiistoj de metereologio [16, p. 18—20].

Aŭtoro en siaj medicinaj konkludoj akceptas antaŭan sciencan vidpunkton. Rilatas la medicinon oka parto de [15] («in octava statu pestis et mortalitatis»⁵⁶⁾).

Donante geografian sciigojn pri italaj, k.a. urboj de Eŭropo, li estas unua ruso, kiu konatigas vastan Eŭropan publikon kun naskaj lokoj Lviv, Drohobyč, Galicio³⁷⁾. [15, p. 2—4].

Li ofte citas Aristotel'on, Al-Bumazar'on Hvidon,on kaj Leopold'on³⁸⁾.

Samtempe kun malmulte probablaj antaŭvidoj (detalan priskribon vidu en [1]). Jurij starigas la fundamentan tezon percepti Universon kaj ĝiajn leĝkonformecojn. Li diras: »Kvankam malproksimaj estas ĉielaj vastecoj, sed ili ne estas tiel malproksimigitaj de la homa menso« [15, p. 1].

35) eldonita de konata roma presejo de Evĥariusa Zilbera (Franka), la 7-an de februaro 1483. Ĝi estis unua presita libro de Ukraino. Nun ĝi estas konata en tri ekzemploj. Fotojn de la Krakova mi danke ricevis de S-ano Denys Czerep.

36) Pli detale pri medicina flanko de lia verko vidu: A. Podrajanskij, Ruskij doktor mediciny XV vjeka, profesor Jurij Drohobyčskij, „Vračebnoje delo“, No 1, 1951.

37) Moskvon li eraro enigis en la Litovan ŝtaton.

38) Jam tio sufiĉe atestas diversflankan klarecon de sciencisto

Dediĉaj vortoj el [14] atestas, ke Jurij kunrilatis iamaniere familion de Bentivoglii en Bolonjo. La Bolonja Universitato ofte kontaktigis kun la najbara Ferara Universitato [13, p. 252—253]. Tiam Ferara altiras astronomojn, kiuj rondiĝas ĉe kortego de Erkole (Erkole d'Este). Tien veturas Jurij kaj dum iu periodo plenumas devigojn de ĉekorta astrologo [11, p. 187—8] (pli ĝuste astrologo de Montferato).

Malgraŭ ke oni promociis lin filozofa kaj medicina doktoro, malgraŭ lia rektora laboro, sciencisto konstante sentas malriĉecon.

Malriĉeco estis ĉefa kaŭzo, por ke li serĉu protektojn de riĉuloj. En Krakova Jagelona biblioteko troviĝas letero³⁹⁾ de Jurij al pola humanisto M. Ĉepla (Mykolaj Czepla), kiu estas skribita el Bolonja la 6-an de februaro 1478. [17].

El letero evidentiĝas ke jam tiam Jurij proponis sin por kompili astrologiajn diverspecajn antaŭvidilojn pro sia malfacila materiala stato. Interalie, kiel rimarkas Doc. dr. Jerzy Zathej, li »sendas samtempe al M. Ĉepla sian »Judicium«... (letero de la 3-a de aŭgusto 1967).

Plej malfrue en la 1488. Jurij revenas⁴⁰⁾ Krakovan Universitaton, kie li instruas astronomion kaj medicinon. De medicina sekcioj⁴¹⁾ 21. V. 1488. li ricevis lokon por konstrui finfine propran hejmon [11, p. 188], kiun li poste testamentos al Krakova Universitato [6, p. 100—101].

Nur nun li multe okupiĝas pri kuracista laboro. Restis dokumento [20, p. 109], datita de la 31-a de julio 1492, kie li estas titoligita kiel »reĝa kuracisto«⁴²⁾. Tiu titolo estis la plej alta en kuracista pola praktiko kaj, restante revo por multaj, estis atribuita nur por altkvalitaj fakuloj⁴³⁾.

J. D. Isajevič supozas, ke en Krakovoj Jurij devis renkontiĝi kun unu el famaj tiamaj humanistoj de Germanujo kaj Pollando poeto Konrad Celtis, Celtis notas, ke lia instruisto estis »roksolando«. Ĉar Gali-

39) mikrorofilmo de kiu estis afable proponita al mi de munusriptejestro en Jagelona Biblioteko Doc. dr. Jerzy Zathej.

40) en [11] oni indikas novembron de la 1487.

41) en Universitataj »konkluzioj« kusiĝas lia peto, direktita al la Universitata konsilantaro [6, p. 100—101].

42) kiel kuracisto ĉe la reĝa kortego de Kazimierz Jagellonczyk.

43) Malgraŭ tio en Pollando konstante mankis kuracistoj. Hieroni mel Kreta, kiu malsaniĝis en 1463. jaro en la norda parto de la lando, devis veturi Krakovon, ĉar »nenie en alia loko oni povas trovi kuracistojn aŭ kuracilojn« (Garo, Geschichte Polens v.p. 198). Certe, ke Jurij de junaj jaroj vidis tiun staton kaj tial ne elektis eklezian vojon promesanta riĉecon kaj trankvilecon.

cion oni ofte nomigis »Roksolanio«, tial probable ke Jurij estis same tiu profesoro, pri kiu skribas Celtis.

Jurij organizigis ankaŭ tiel nomitajn »resumpciojn«, pagitajn de studentoj. Ĉi studoj okazis en studentaj komunloĝejoj (»bursoj«). Tiam en Krakova Universitato studis fama pola astronomo M. Kopernik. Ĝis nun ne estas trovitaj iuj rilatoj inter ili, kvankam vivo kaj kreado de Kopernik estas bonege trastudita en Pollando (kaj eble tio estas la plej grava kaŭzo, ke neniu eĉ hitopezas simile). Sed ni ne devas forgesi, ke M. Kopernik estis tiam tute nekonata ankoraŭ studento kaj eblaj hazardaj renkontiĝoj ekster aŭ en Universitato certe restis ne fiksitaj. Nur atenta trastudado de astronomiaj unuaj konceptoj kaj medicinaj studoj de Kopernik kaj la samoj de Jurij eble klarigos ion.

Dum lastaj jaroj Jurij amikiĝas kun pola magistro Wojciech de Pniew 1, p. 188, vizitadis Lviv kaj Drohobyč. Li mortis la 4an de februaro 1494. en Krakovo kie li estis enterigita (Acta Rect. n. 1653).

Literaturo

- [1] . J. D. Isajevyč, Jurij z Drohobyča, Ukrajinskyj istoryčnyj jurnal, 1960, N^o. 4 (Kyjiv).
- [2] . Historija oteĉestvenoj matematiki, t. 1, Kiev, 1966.
- [3] . J. D. Isajevyč, Bratstva ta jiĥ rol v rozvytku ukrajinskoji kultury XVI—XVIII st., Kyjiv, 1966.
- [4] . Zbior pamietnikow o Polsce z rekopismow ... wyd. nowe Jana Nep. Bobrowicza, t. 1, Lipsk, 1838.
- [5] . Chmiel, Album Studiosorum Universitatis Cracoviensis, vol. I—IV, Cracoviae, 1887.
- [6] . Kazimierz Morauski, Munera Saecularia Universitatis Cracoviensis, Historia Universytetu Jagiellonskiego, vol. II, Krakow, 1900.
- [7] . J. Dianni, A. Wachulka, Tysiac lat polskiej mysli matematycznej, Warszawa, 1963.
- [8] . Ukrajinska Zahalna Eencyklopedija, I, II, III pid red. I. Rakowskoho, Lviv-Stanisław-Kolomyja.
- [9] . A. Diani, Studium Matematyki na Uniwersytecie Jagiellonskim do polowy XIX wieku, Krakow, 1963.
- [10] . N. A. Oborin, Pervyj ruskij doktor medicyny Georgii Drohobyč, »Sovetskaja medicina«, N^o. 2, 1954.
- [11] . Polski slownik Biograficzny, Wroclaw-Warszawa-Krakow, 1961. t. XI/2, z. 49, str. 187—8.
- [12] . Ettore Bortolotti, L'école mathématique de Bologne, Bologne, 1928.

- [13] . A. Sorbelli, Storia della università di Bologna ie medio evo (secc XI—XV), Bologna, 1944.
- [14] . manuskripto N^o. 647 en Bavara ŝtata Biblioteko [en USSR mikrofilmo konserviĝas en arkivo de la Ukraina Akademio de Sciencoj.]
- [15] . Judicium prenosticon Magistri Georgii Drogobicz de Russia, Roma, 1483.
- [16] . G. Helmann, Welterprognosen und Welterberichte des XV und XVI Jhdts, Berlin, 1899.
- [17] . Rkp Bj 6394 en manuskriptejo de Krakova Jagelona biblioteko.
- [18] . Rkp 1507, Zamitka Kreveckoho Ivana pro knyhu Jurija Drohobyča z XV st, Centra istor. arkivo en Lviv.
- [19] . Birksmajer A. L., Mikołaj Wodka z Kwidzyna zwany Abstemiusz lekarz i astronom polski XV stolecia, „Roczniki Tow. Nauk. w Tor.”, T. 33, 1926.
- [20] . J. Lachs, Kronika lekarzy hrakowskich do konca XVI wiecku. Archiwum do dziejów literatury oswoświaty, t. XII.
- [21] . J. D. Jsajewicz, Jerzy z Drogobycza we Wlochech i w Krakowie, „Mpol. Studia Hist.” R.6: 1964 z 3/4.

Al leganto: Nur pere de Esperanto mi havis okazon rapide ricevi necesan materialon el diversaj fontoj. Laborante pri temo „Evoluo de matematiko en Ukraino kaj sciencaj interrilatoj kun aliaj landoj en X—XVIII jarcentoj”, mi volonte akceptos ĉiujn rimarkojn, konsiderojn, proponojn kunlabori k.s.

La materialo: Adreso: Kiev — 57, Potje, 9

klub „Esperanto”

Jaroslav Matvijiŝyn